# Kaki (persimonoj) en la mondo

世界の柿情報



La 5an de novembro mi eksekigis maldolĉajn persimonojn, japane kaki, en mia ĝardeno. Tiutempe ili estis tre maldolĉaj kaj ne manĝeblaj.

2025.11. 8 Belgio
Dankon por la informo.
Mi neniam manĝis kakiojn. Sed, mi volis provi manĝi ilin.
Do mi aĉetis hieraŭ kelkajn kakiojn. Sed mi ne bone scias kion fari nun. Mi legis vin kaj mi pensas ke mi atendos kelkajn tagojn antaŭ manĝi ilin.
Amike, Viviane

Kara Viviane,

Certe vi aĉetis dolĉajn kakiojn, do vi povas tuj manĝi. Se ili estas maldolĉaj, senŝeligu kaj pendigu ilin ekstere dum du semajnoj.

En la japana proverbo: Kiam kakioj ruĝiĝas, kuracistoj paliĝas. Ĝi signifas, ke kakioj estas bonegaj por la sano. Jasuo

2025.11.17 Belgio
Mi volis diri al vi : mi hieraŭ manĝis mian unuan kakion : tre bonega frukto.
Bonan vesperon, Viviane

2025.11.18 Belgio
Miaj kakioj venis el Italio (Sicilio).
Amiko persone konas la farmiston. Li ne uzas sintezajn pesticidojn. Li kultivas laŭ la malnova maniero. Kaj unufoje monate, kamiono foriras de tie kaj venas ĝis Belgio. Ĝi ne pasas tra iuj vendejoj: ĝi iras rekte al la finaj klientoj. Tiel,

liaj fruktoj kaj legomoj estas ankoraŭ freŝaj kaj ankaŭ pli malmultekostaj.
Amike, Viviane
2025.11.20
Nun kakioj sufiĉe sekiĝis kaj sur la haŭto aperis blanka pulvoro, kaj tio signifas, ke ili jam estas manĝeblaj.
En kelkaj tagoj mi konservos ilin endome, kaj mi povas manĝi ilin eĉ post unu, du monatoj. Se mi povus donaci ilin!



**11月5日　日本**
庭で渋柿（日本語で「柿」）を干しました。その時はとても苦くて食べられませんでした。

**2025年11月8日 ベルギー**
情報ありがとうございます。 柿を食べたことがないのですが、食べてみたいと思いました。
昨日柿を買ったのですが、どうしたらいいのかよくわかりません。あなたの話を読んで、数日待ってから食べようと思っています。 ヴィヴィアン

**ヴィヴィアン様**

それはきっと甘い柿です。すぐに食べられますね。もし渋かったら皮をむいて 2 週間ほど外に吊るしておきましょう。 日本の諺に「柿が赤くなると医者が青ざめる」というのがあります。これは柿が健康に良いという意味です。ヤスオ

**2025 年 11 月 17 日 ベルギー**

昨日、初めて柿を食べました。とても美味しい果物です。私の柿はイタリア（シチリア島）から来ました。 友人がその農家さんと個人的に知り合いなんです。彼は合成農薬を使わず、昔ながらの方法で育てています。そして、月に一度、そこからトラックがベルギーにやって来ます。お店を経由せず、直接最終消費者の元へ届けられるんです。そうすることで、果物や野菜は新鮮で、しかも安く手に入るんです。

**2025. 11. 20 日本**

柿はだいぶ乾いて、皮に白い粉が出てきました。もう食べられる状態です。 数日後には室内で保存しますが、1、2 ヶ月後でも食べられます。あなたにあげられたらいいのに！

**Italio**

Kara Jasuo,

en Italujo oni ne sekigas la persimonojn. Oni kolektas ilin, kiam ili estas tre malmolaj kaj ne manĝeblaj. Poste oni metas ilin en grandan poton kune kun pomoj kaj atendas dekon da tagoj, ĝis kiam la frukoj iĝas molaj kaj tre dolĉaj.

Mi ŝatas manĝi persimonojn.

Amike salutas vin, Enrike

**Brazilo**

Ho, tre intresa. En Brazilo ni ankaŭ manĝas persimonon, tamen la plej populara specio estas ruĝa, kaj ne bezonas sekiĝon.

Ĉi tie ni manĝas ilin kutime en aprilo kaj majo.

Amike, Rafael

**2025.11.23 Japanio**

Mi ricevis de mia amiko 20 maldolĉajn kakioj. Lerninte la italan manieron mi metis ilin en grandan plastan sakon kun du pomoj. Mi esperas, ke ili dolĉiĝos post 10 tagoj.

Jam la kakioj pendigitaj en la ĝardeno estas sufiĉe bone sekigitaj, do mi metis ilin en la kestojn, fortranĉinte malbelajn foliojn ĉe la kapoj.



Mi rigardis la kakiojn kaj trovis, ke iu havas tre imponajn vizaĝojn. Sube estas la kaki kun la plej impona vizaĝo.

### イタリア

イタリアでは柿を干しません。とても硬くて食べられない時に収穫します。そして、リンゴと一緒に大きな鍋に入れて、実が柔らかくなってとても甘くなるまで 10 日間待ちます。私は柿を食べるのが好きです。 敬具、エンリケ

### ブラジル

おお、とても興味深いですね。ブラジルでも柿を食べますが、最も人気のある品種は赤柿で、干す必要はありません。 こちらではたいてい 4 月と 5 月に食べます。

敬具、ラファエル

### 2025. 11. 23 日本

友人から苦い柿を 20 個もらいました。イタリアのやり方を学んで、大きなビニール袋にリンゴ 2 個と一緒に入れました。10 日後に甘くなるといいのですが。

庭にぶら下がっている柿はすでにかなり乾燥しているので、上の方の醜い葉を切り取って箱に入れました。 柿をよく見てみると、とても印象的な顔をしているものがありました。以下は、その中でも特に印象的な顔をしている柿です。



2025.11.26 Japanio

Hodiaŭ ni plukis dolĉajn kakiojn. Mi memoras, ke antaŭe ni plukis ilin fine de oktobro, sed ial aŭ pro klimatŝanĝo pluksezono tre malfruiĝis. Branĉoj de kakiarbo estas facile rompeblaj, do ni kun atento plukis la fruktojn.





Mia filino venis al ni antau semajno, kaj profitante ŝian restadon, ni kune plukis kakiojn. Sajne la nombro de kakioj estis ne tiel multaj, sed fakte la nombro estas 300. Tro multaj！ Ni jam disdonis 30 al miaj najbaroj.

2025.11.26　日本

今日は甘い柿狩りをしました。以前は10 月末に収穫していたのですが、何かの理由でか、あるいは気候変動の影響で、収穫時期がかなり遅れてしまいました。

柿の木は枝が折れやすいので、実を丁寧に摘みました。　1 週間前に娘が遊びに来たので、彼女の滞在を利用して一緒に柿狩りをしました。柿の数はそれほど多くないように見えましたが、実際には 300 個もありました。多すぎます！すでに近所の人たちに 30 個お裾分けしました。



2025.12.3 Japanio

Laŭ la kutimo de italoj mi metis maldolĉajn kakikojn en la plastan sakon kun pomo. Jam du semajnoj pasis, do mi malfermis la sakon kaj trovis, ke la kakioj fariĝis dolĉaj, sed tro molaj, Mi ŝatas ankau molajn kakiojn, do mi gustumas ilin kun plezuro.



2025. 12. 3 日本

イタリアの習慣に従って、渋い柿をリンゴと一緒にビニール袋に入れました。2 週間経って袋を開けてみると、柿は甘くなっていたものの、柔らかすぎました。でも私は柔らかい柿も好きなので、美味しく食べています。